# EKO 2023

Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

ilei IKEF UMEA

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

**EKO 2023 / 24. Aprilo 25, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**


## Sen-egale en Senegalo

Senegalo ĝuis riĉan jaron 2022 pri Esperanto dank'al kunlaboro de ILEI, kaj de Mireille GROSJEAN, honora prezidantino de ILEI. Kunlaboris ankaŭ UEA kaj la Afrika Komisiono de UEA. Helpis Svisa Esperanto-Societo kaj mecenatoj.

En 2022, de januaro ĝis septembro, kiel kutime, estis kursoj dum renkontiĝoj de la landa asocio, kiuj okazis unufoje dumonate. Feliĉe, kadre de preparo de la 8-a AKE en Senegalo, de la 10-a de oktobro ĝis la 24-a de decembro intensaj kursoj okazis : duhoraj kursoj, kvin tagoj ĉiu semajne. En du malsamaj urboj, en Dakaro kaj en Rufisko, estis kursoj alterne, semajno post semajno. Sinjoro Vjacheslav IVANOV de Rusio, estis nura kursgvidanto de oktobro ĝis la 9-a de decembro. Ekde la 10-a de decembro estis du instruistoj pro alveno de Sinjoro Espoir KASATI de DR Kongo kiu estis la dua elektita instruisto de pria ĵurio de ILEI, post rigora procezo de elektado de spertaj instruistoj por gvidi kursojn en Senegalo.

Ekde la 12-a decembro, ambaŭ instruistoj intervenis samtempe, unu en Rufisko, la alia en Dakaro kaj inverse sekvan semajnon. Komence kursanaro estis pli ol 30 interesuloj kaj finfine dudeko estis testita dum la 8-a AKE.

Ni dankas Mireille GROSJEAN pro ŝia fidela raporto pri intensaj kursoj. Tute normale ni senegalanoj nuntempe alfrontas al daŭrigo de instruado per ni mem por eviti, ke la komencantoj ne perdu interesiĝon kaj nivelon ; Senegalo bezonas multigi de jaro al jaro sian esperantistaron, por tio necesas konstanta kunlaboro de ILEI.Mi jam komencas gvidi kursojn profite de la grupo de Dakaro (Klubo de Dakaro) kaj ne ankoraŭ kursoj por la grupoj de Rufisko, kaj de Goromo. En Dakaro, kursoj estas gvidataj de Lafi Charles DIATTA, aliaj kursgvidantoj estas Assane FAYE (la prezidanto de landa asocio, sur la foto) kaj Ismaila NDIONE, estrarano de la senegala esperantisto-junularo kaj instruisto.




Lafi Charles DIATTA, sekciestro, Poŝtokesto : BP 17935 DAKAR/LIBERTE,
Retaderso : laficharlesd@gmail.com

## Penseo 378 por vi en la Uni-verso

Plia poezia bukedo por vi, alkroĉita. Poezi-amantoj ĝuu tion, Bonkvalita servo el Ĉinio.

## Litovie por ĵurnalistoj denove

Organizantoj informas, ke prepariĝo al la tradicia jam la 16-a seminario de esperantistoj-ĵurnalistoj, kiu okazos la 20-an ĝis la 21-a de majo, 2023 apud Kaunas, iras glate kaj sukcese.Al la aranĝo jam aliĝis 35 partoprenantoj el 8 litoviaj urboj. Ni atendas pliajn. En la programo estas antaŭviditaj jenaj aferoj:

1. Prezentado de la nova "Granda Esperanta-litova vortaro" de Petras ČELIAUSKAS ( 810 paghoj, 52000 vortoj ). Partoprenos la autoro de la vortaro Petras ČELIAUSKAS kaj direktoro de la Monda centro de litovoj Valdas KUBILIUS. Eblos akiri la vortaron kun rabato.
2. Specialisto pri komunikado kaj publikaj rilatoj, historiisto kajĵurnalisto Linas KONTRIBUAS prrelegos pri la temo "ĉu povas esti neveraj novaĵoj ? kaj gvidos tiuteman diskuton.
3. Okazos renkontiĝo kun fama Litovia pentristo, karikaturisto, humuristo, poeto kaj ilustranto de libroj, ĵurnalisto Vladimiras BERESNIOVAS ( Vlaberis ). Funkcios ekspozicio de liaj verkoj.
4. Profesorino de la Kaunas universitato Vytautas, La Granda Sigita BARNIŠKIENĖ faros prelegon '' El la historio de la evoluo de Esperanto".
5. Gražino OPULSKIENĖ rakontos impresojn el sia vojaĝo al Israelo kaj partopreno en la kongreso de esperantistoj de Israelo.
6. Direktoro de la Monda centro de litovoj Valdas KUBILIUS rakontos pri Centro.
7. Okazos renkontiĝo kun la fama litova verkisto ka ĵurnalisto, aŭtoro de pli ol 30 libroj, ĉefredaktoro de la eldonejo "Ryto varpas", Juozas KUNDROTAS.
8. Kvizon pri Esperanto-movado gvidos Vytautas ŠILAS.
9. Sabate ludos per violono Sigita RAILAITĖ-SIČIŪNIENĖ, el Islando.

## Japanaj universitatoj ja okazigas Eo-kursojn

Jen la informoj pri la instruado de Esperanto en kvar Japanaj universitaoj

◆ Osaka Universitato (ŝtata)
Kursperiodo: Unua kaj Dua semestro, kun po 2 kreditoj
Instruisto: KADOYA Hidenori (docento?)
Nombro de studentoj: ĉirkaŭ 40
Instrumaterialoj: “New Express Plus-Esperanto”, “Esperanto per ekzercaro por japanlingvaj lernantoj”, PVZ, k.t.p.
Nivelo: Okazos la kurso ankaŭ en Unua semestro 2023.

◆ Kyusyu-Universitato （ŝtata）
Kursonomo: Fulmkurso de Esperanto
Kursotipo: intensiva (6-taga) kurso, kun 2 kreditoj
Instruisto: TABATA Yosiyuki (prof.)
Nombro de studentoj: ĉirkaŭ 20
Instrumaterialoj: memfaritaj materialoj, partoj de “Ĉu vi parolas Esperante?”, “Mazi en Gondolando”, k.t.p.
Nivelo: Okazos fizike la kurso en septembro, 2023

◆ Kioto-Sangyo-Universitato (privata)
Kursonomo : Enkonduko al Esperanto
Kursperiodo : Printempa semestro kaj Aŭtuna semestro, kun po 2 kreditoj
Instruisto: Ĉida Syuntaro
Nombro de studentoj: pli malpli 20
Instrumaterialoj: memfaritaj materialoj
Nivelo: Povus okazi la kurso ankaŭ en 2023

◆ Kioto-Universitato (ŝtata)
Kursonomo: Enkonduko al Esperanto
Kursotipo: portempa seminario por unuajaruloj
Kursperiodo: Dua semestro en 2022, kun 2 kreditoj
Instruisto: Ĉida Syuntaro (prof.)
Nombro de studentoj: 8
Instrumaterialoj: memfaritaj materialj

Tieko Isikawa <tiekosanjo_103@bj8.so-net.ne.jp>

# Kubaj dimensioj



La 25-an de marto 2023 en la Esperanto-Centro de Havano okazis la 37-a Komitatkunsido de KEA. Ĝin partoprenis komitatanoj kaj reprezentantoj el 16 filioj, grupoj kaj delegitoj de nia lando (el totalo 19). Oni revuis la jaran agadon dum 2022.

**Informado:**

- Gazetaraj komunikoj: Pri la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo kaj pri Esperanto-libro dediĉe al la kuba nacia heroo José Martí "De kreskas la palmo"
- Partopreno en nacia televida programo parolante pri la Eo-disaŭdigoj de Radio Havano Kubo. La TV-programo estis dediĉita al la Centjariĝo de la kuba radio."
- Varbado por Esperanto-kursoj en loka ĵurnalo
- Varbado dum la Internacia Librofoiro de Havano kaj en aliaj provincoj kiel Guantánamo, Santiago de Kubo, Granma kaj Villa Clara. En ĉiuj teritorioj okazis libroekspozicioj en Esperanto.
- Agado en la sociaj retoj

**Instruado:**

- Laboro en la dek sep lecionoj de la lernolibro por hispanparolantoj
- Verko de broŝuro Esperanto en dekdu lecionoj
- Daŭra disvastigo de Esperanto en la Havana Pedagogia Universitato
- Kursoj de Esperanto en Santiago de Kubo

**Kapabligo**

AMO-seminario 92: okazis dusesia seminario en oktobro en la ĉefurbo Havano kaj en decembro en la provinco Guantánamo en la oriento kadre de la regiona evento Zamenhofa metiejo. ( Raportoj en Revuo *Esperanto* dec.22 kaj marto 2023). Kun la financa subteno de UEA kaj KEA, ĝi estis tre bona sperto kaj ĝin partoprenis entute 44 kubaj esperantistoj el diversaj regionoj de la insulo.

**Publikaj rilatoj**

Daŭraj kontaktoj kun la ministerio de kulturo, kies reto de kulturdomoj kaj bibliotekoj tra la tuta lando malfermas spacojn por kursoj kaj aliaj renkontiĝoj. Tre aktivaj kontaktoj okazas en la provinco Villa Clara, ĉefe en la municipo Santo Domingo kies biblioteko estas ĉiam malferma por Eo; same bona rilato ekzistas en la provinco Guantánamo, kie  la provinca biblioteko posedas ĉambron por Esperanto-libroj, kiu ĉi-jare estis reordigita kaj ebligis spacon por Eo-kunvenoj kaj partopreno en la kulturaj programoj de la biblioteko; same okazis kun la provinca muzeo, kiu akceptis la proponon fondi Eo-muzeon en sia domego, ĉiukaze estus la sola en Kubo. Bezonatas subteno de esperantistoj por kolekti indajn muzeaĵojn.

**ACNU.** Dum la jaro aktivis la rilatoj kun la Kuba Asocio de UN. Kiel kolektiva membro de tiu ĉi organizo, ni partoprenis kunvenojn kaj renkontiĝojn organizitajn de ACNU kun aliaj organizoj diplomatoj kaj aliaj eventoj, kie Eo ĉeestis.

### Ĉefaj defioj/taskoj por 2023

La komitato konstatis ke la landaj kondiĉoj postpandemiaj ankoraŭ ne favoras la viv-normaliĝon pro ekonomiaj malfacilaĵoj, kio negative influis la vivon asocian kaj agadojn. Tiu ĉi situacio baris la kompletan restariĝon de la movado.

*Kromaj taskoj por 2023*

- Revarbi iamajn membrojn kaj varbi novajn
- Reveni al ĉeestaj kursoj regulaj tra la tuta lando
- Solvi loĝistikon por la oficejo kaj la E-domo, libroservo kaj biblioteko
- Restarigi la retpaĝon de KEA
- Pli aktive agadi en sociaj retoj  tra la tuta lando

### Eventoj lokaj

- Partopreni la librofoiron 2023 diversloke per libroekspozicioj
- Prelego okaze de la 44-a datreveno de KEA en junio en la Konferencejo de la municipa biblioteko Abel Santa María (Santiago de Kubo)
- E julio  en la provinca biblioteko Elvira Cape okazos prelego de la kuba historiisto Juan Ramón Rodríguez kun partopreno de lingvistoj el la urbo Santiago de Kubo.
- Krisolaj Esperanto-Tagoj (KET), Kampadejo La Sierrita, en majo 2023 en la provinco Granma
- Zamenhofa Metiejo (ZM decembre 2023 en la provinco Guantánamo

========= vortoj:  1310 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.  Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php  por 2023 (ĝis 20.).

Aliaj Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.